

# Informilo de Septembro 2016

Numero 24, septembro 2016

## Prezidanto Fettes: “Niaj kongresoj pruvas la potencon de lingvo neŭtrale homa por transponti la barojn, kiuj dividas nin.”

**24 julio 2016.** “Multegaj homoj tra la mondo suferas pro militoj, pro persekutoj, pro manko de bazaj vivrimedoj,” atentigis d-ro Mark Fettes, prezidanto de UEA, en sia malferma parolado al la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Slovakio en julio. Parolantoj de Esperanto, “lingvo neŭtrale homa,” kiu “transpontas la barojn, kiuj dividas nin,” unike situas por influi la mondon pozitive. Alude al la iniciatinto de Esperanto, L.L.Zamenhof, kiu en la jaro 1913 deklaris “Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion,” Fettes atentigis la pli ol mil kongresanojn pri la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies lingvaĵo kvazaŭ eĥis la mondpercepton de Zamenhof. Li notis, ke la du Internaciaj Paktoj kiuj plie difinis la Deklaracion, nome tiuj pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj kaj pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, festos sian 50an datrevenon en decembro ĉi-jare.

La kongresa temo estis “Socia Justeco – Lingva Justeco.” “Ni ĉiuj komprenas, ke diversaj homoj spertas marĝenigon kaj ekskludon en niaj nuntempaj socioj,” Fettes diris. Sed ili ofte ne konscias, ke lingvo ludas ŝlosilan rolon en tiu ĉi procezo. “Lingvo estas tiel fundamenta parto de la strukturo de socio, ke ĝi estas ofte nevidebla, kiel akvo por fiŝo. Ni ofte ne rimarkas, kiam aliaj homoj spertas marĝenigon aŭ ekskludon pro lingvo, same kiel ni ne perceptas, kiel lingvo estas parto de tiaj esencaj sociaj servoj kiel sanprizorgo aŭ edukado.”

## UEA funebras la forpason de gvida pledanto por Esperanto, Nobel-premiito

**23 aŭgusto 2016.** Reinhard Selten, gvida pledanto por Esperanto kiu ricevis la Nobel-Premion por Ekonomiko en 1994 pro sia laboro super ludo-teorio, mortis je la aĝo 86. Filo de esperantisto, li lernis la lingvon aŭtodidakte kiel 17-jarulo, renkontis sian edzinon pere de Esperanto, kaj instruis la lingvon al sia pli juna frato. Li estis Dumviva Membro de UEA kaj membro de ties Honora Patrona Komitato. Kune kun Jonathan Pool li verkis enkondukon al ludo-teorio (1995, en Esperanto) kaj kun Helmar Frank studon de dulingveco en Eŭropo (2005, en la germana lingvo). Li instruis, sinsekve, ĉe la Libera Universitato de Berlino, la Universitato de Bielefeld, kaj la Universitato de Bonn. Li ankaŭ gastprofesoris ĉe la Universitato de Kalifornio, Berkeley, Usono.

## Kongresanoj: “La strebado al lingva justeco estas aspekto de pli larĝa, plurkampa lukto cele al socia justeco kaj homaj rajtoj por ĉiuj”

**15 septembro 2016.** Serio de viglaj kunsidoj pri la temo “socia justeco – lingva justeco” kunvenigis esperantistojn el ĉiuj mondopartoj dum la Universala Kongreso de Esperanto en Nitro ĉi-julie, laŭ la fina raporto pri tiuj sesioj farita de iama estrarano de UEA José Antonio Vergara (Chile). Vergara, kune kun Manuela Ronco (Italio), Paulína Kožuchová (Slovakio) kaj A. Giridhar Rao (Barato), gvidis la diskutojn, kiujn suplementis du seminarioj, pri la lukto kontraŭ seksismo kaj rasismo (gvidis Adje Adjevi, Togolando, kaj Elisabeth Schwarzer, Germanio), kaj pri literatura esprimo (gvidis István Ertl, Hungario/ Luksemburgo).

Laŭ la raporto, “la formoj de socia subpremado povas viktimitigi unuopajn homojn kaj grupojn laŭ iliaj diverskategoriaj identecoj (raso, genro, seksa orientiĝo, handikapeco, ktp), kiuj ofte interligiĝas kaj interagas ĉe unuopaj individuoj.” Tiuj formoj de socia subpremado inkluzivas la subpremadon de lingvoj kaj iliaj parolantoj, kaj la fortenon de la lingvaj rajtoj de infanoj, precipe iliaj rajtoj lerni en la propraj lingvoj. Dum la lingva aspekto de la forteno de homaj rajtoj estas tro ofte subtaksata aŭ ignorata, ĝi konsistigas unu aspekton de la multe pli granda lukto por homaj rajtoj kaj pozitive bazita nediskrimincio ĝenerale.

“La kongresanoj kiuj partoprenis la kongresteman diskutadon esprimis,” laŭ la raporto, “la decidon engaĝi sin en la strebado fari siajn respektivajn sociojn kaj sian komunan kvazaŭan landon Esperantujo pli justaj,” ĉar “ni vidas en ĉiu homo nur homon (kun liaj/ŝiaj libere difinitaj identecoj), subjekton de esencaj digno kaj rajtoj.”

Tiuj konkludaj rimarkoj helpas difini la estontan agadon de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝian kunlaboron kun aliaj Neregistaraj Organizaĵoj dediĉitaj al homaj rajtoj kaj socia justeco.

## Konferenco traktis lingvan komunikadon en la Eŭropa Unio

**15 aŭgusto 2016.** “Perspektivoj de Lingva Komunikado en la Eŭropa Unio” estis la titolo de konferenco en Nitro, Slovakio, la 28-an kaj 29-an de julio kunlige kun la Universala Kongreso de Esperanto. Pli ol cent fakuloj pri eŭropa lingvopolitiko partoprenis la konferencon, kiun oni plenumis per tri lingvoj – slovaka, angla kaj Esperanto. Inter la parolantoj estis la iama Eŭropa Komisararo pri Multlingvismo, Ján Figel (kiu alparolis la konferencon en la angla), kaj la nuna Eŭropa Komisararo pri Sano kaj Nutraĵosekureco, Vytenis Povilas Andriukaitis (kiu parolis en Esperanto). La konferenco okazis en la Universitato de Konstanteno Filozofa. Inter la temoj traktitaj estis la aktuala lingva situacio en EU – ties politiko kaj ties praktiko – kaj lingva demokratio kaj socia justeco, precipe en rilato al civitana partopreno kaj ekonomia integriĝo. La nunaj krizoj de la Eŭropa Unio, el kiuj multaj havas siajn fortajn lingvaj kaj kulturajn komponentojn, donis certan urĝon al la diskutoj. Figel atentigis pri nuntempa falo de la lingvaj kompetentoj en kelkaj landoj de EU kaj pri la prefero al la angla, kio malfortigas la aliajn lingvojn. “Nun venis la tempo por serĉi novajn solvojn,” li aldonis. Vytenis Andriukaitis indikis al la bezono de multlingvismo por kontraŭbatali diskriminacion, kaj por evoluigo de la lingvaj kompetentoj necesaj por dungigo kaj persona disvolviĝo. Ni ne povas dependigi nin de tradicia lernado por solvi tiujn problemojn: ankaŭ la dumviva lernado ludas gravan rolon.

## Forumo alvokis al interreligia agado

**15 aŭgusto 2016.** Pli ol 150 partoprenantoj el 20 landoj, tri kontinentoj kaj sep mondaj religioj, kune kun aliaj religiaj, spirita aŭ humanismaj tradicioj, kunvenis en Nitro, Slovakio, la 25-an de julio, por partopreni kunvenon de la Mezeŭropa Interreligia Forumo. La kunvenon oni aranĝis por koincidi kun la 101-a Universala Kongreso de Esperanto samtempe okazinta en Nitro. Kiel klarigis ĝia konkluda deklaro, “La Forumo (CEIF 2016) kunvenis en la antikva kultura kaj spirita centro de Slovakio por interŝanĝi fascinajn interreligiajn kaj civilajn ideojn serĉade al solvoj al la kreskanta etna, kultura kaj religia streĉiteco en Eŭropo. La konsternaj tendencoj al naciismo, ekstremismo kaj ksenofobio en niaj socioj, kune kun la kompleksaj mondaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj problemoj, postulas dialogon inter

la spiritalaj aŭtoritatoj, komunumoj kaj gvidaj institucioj de la mondo. Jen la speco de dialogado, sekvata de praktika agado, kiun la Mezeŭropa Interreligia Forumo celas inspiri.”

La Forumo proponis tri “forporteblojn”:

- En tiu ĉi malheliĝanta tempo, dialogo esencas. Vera dialogo, tamen, devas okazi en spirito de respekto por la aliulo. Vera dialogo devas esti subtenata de scio.
- “Vivi kaj lasi vivi” ne plu sufiĉas en Eŭropo superŝutita de migrado kaj aliaj defioj. Solidareco en agado devas baziĝi sur la principo “vivi kaj helpi vivi.”
- Ĉar oni ofte perceptas religiojn kiel fontojn de konflikto, kredantoj en ĉiuj religiaj tradicioj devas ludi aktivajn rolojn en la publika vivo kaj kuraĝe prezenti, sen mistordoj, la realecon de la vivo kiel kredanto kaj la kapablon de religio kiel pozitiva forto.

## **Aktiva somero: La UEA-oficejo ĉe UN kiel vera abelujo**

**16 septembro 2016.** Aldone al sendo de dupersona delegacio al la konferenco de neregistaraj organizaĵoj en Koreio komence de la somero, la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj sendis du partoprenantojn al la ĉi-jara konferenco de la Akademia Konsilio por UN-Studoj, kiu kunvenis en la urbocentra kampuso de la Universitato Fordham en Novjorko, kaj la oficejo estis ankaŭ reprezentata en la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, en Slovakio, kie Humphrey Tonkin gvidis seminarion pri Unuiĝintaj Nacioj kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE), kaj prezidis la regulan kongresan kunvenon pri la agado de la asocio ĉe la oficejoj de UN kaj Unesko en Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj Parizo. Multajn aliajn UN-kunsidojn en Novjorko prizorgis Allison Thorsen, Humphrey Tonkin, kaj nia dumsomera staĝanto Sam Winkelman, studento de germanistiko en Centre College, Kentukio. Michael Brandini kunvenigis plurajn konversaciajn grupojn en Novjorko. Humphrey Tonkin ankaŭ prelegis pri la CDE en la kongreso de la Itala Esperanto-Federacio en Frascati, kaj Thorsen kaj Tonkin reprezentis UEA en la Pintkonferenco de Neregistaraj Organizaĵoj fine de aŭgusto. Steven Brewer prizorgis grandan donacon de Esperanto-libroj al la Esperanto-kolekto en la Universitato de Masaĉuseco, kaj Robin Hill kaj Scott Turton prilaboris renovigon de la retejo de Esperanto por UN. Inter lastatempaj vizitantoj al Novjorko estis François Lo Jacomo, unu el la reprezentantoj de UEA ĉe Unesko, kaj José Antonio Vergara, eksestrarano de UEA.

## **Interveno ĉe UN en Ĝenevo**

16 julio 2016. Stefano Keller, ĉefreprezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, ĉeestis la 9-an sesion de Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP, 11-15 julio 2016). Keller intervenis pri la tagorda punkto 7: La celoj de la daŭripova evoluo kaj la rajtoj de indiĝenaj popoloj. Li atentigis pri la signifo de konoj de indiĝenaj popoloj pri naturo kaj la konservado de la vivdiverseco, kiuj estas pluportataj per iliaj lingvoj. Li substrekis, ke la biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj.

Li citis partojn de la Deklaracio de la 64-a Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj, organizita de UN en Bonn, Germanio (2011), pretige al la konferenco “Rio+20”. Tiam, Keller sukcesigis kun sia teamo akceptigi en pluraj frazoj de la Deklaracio ĉiujn proponojn de UEA pri lingvaj rajtoj kaj Esperanto, eĉ du kompletajn alineojn, el kiuj li citis la jenan: “Ni alvokas pri la respekto kaj inkludo de la etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiuj entenas informojn pri la komplekseco de la naturĉirkaŭaĵo, kaj alvokas pri la konsidero de la ebleco utiligi neŭtralan internacian lingvon, facile lerneblan.”

Li subtenis la intervenojn de aliaj reprezentantoj, kiuj parolis pri la graveco de gepatralingva edukado kaj pri la malrespekto de lingvaj rajtoj de indiĝenoj. En la tutsemajna sesio, per diverslingvaj informiloj, en personaj kontaktoj kaj en sia alparolo, Stefano Keller zorgis pri abunda informado pri UEA, Esperanto, la Esperanto-Tago, lingva justeco kaj la 101-a UK.

Pliaj informoj: <http://www.linguistic-rights.org/eventoj/#EMRIP9>

*Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:*

*777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.*

*212-687-7041*

[www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org)

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041